Sesa jaro: n-ro 4—5 Okt -Nov. 1940

# LA JUNA VIVO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO
Ĝironumero
209354 Nederl.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0.80 GULDENO

Jarkotizo T. J. O. inkl.
„La Juna Vivo" 1 gld.

MONATA ORGANO
POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

**Por progresintoj.**

## EL LA TAGLIBRO DE s-ro PLUMULO.

„Labori kaj ne seniluziiĝi".
(Carlyle.)

**Ankaŭ morgaŭ!**

Mi sidas ekstere, en la kvieto de la somervespero. Alte en la ĉielo sin pelas birdoj, sag-rapide, en senripoza pelado. Post momento ili revenas, samrapide, kaj tuj denove sin turnas. Kien volas tiuj birdoj, al kiu celo ili sin pelas? Ĉu estas nur ludo? Aŭ ĉu ili ion serĉus? Senripoze rapidas la birdoj tra la aero, jen malproksime, jen super mi....

Mi sidas ekstere en la kvieto de la somervespero. Miaj pensoj vagas tien kaj reen. Jen ili haltas en la pasinto, jen ĉe hodiaŭa okazo. Tiel la pensoj en nur kelkaj momentoj povas trapasi plurajn jarojn. Ili venas kaj iras en multkolora sinsekvo.... Ĉu estas nur ludo? Aŭ ĉu ili en la pasinto serĉus ion, el kio ili povus ĉerpi utilon por la nuno?

Pensoj venas kaj iras en multkolora sinsekvo. Subite ekaperas antaŭ mi urba parto de Parizo, kia mi vidis ĝin en brila tago, antaŭ nur kelkaj jaroj. Mi vidas grandegan placon, al kiu de ĉiuj flankoj direktiĝas vojoj: la Place de l'Etoile. Alta sin montras la „Arc de Triomphe". Se oni staras supre sur ĝi, oni vidas belegan spektaklon. Enpense mi staras antaŭ tiu konstruaĵo kaj mi rigardas en la spacon sub la arkaĵo. Jen mi ree vidas antaŭ mi la Tombon de la Nekonata Soldato, kiel ĝi tiun matenon kuŝis antaŭ mi, surverŝata de sunlumo; kelkaj

pro la somervarmego jam duonvelkintaj florbukedoj kuŝas sur ĝi. Mi rigardas al la lumo, kiu tage kaj nokte flamadas sur la tombo: la eterna flamo.

Venteto alglitas, malaltigas la flamon. Ŝajne ĝi subite ne plu estas, ĉu la vento ĝin estingis? Tamen jam ĝi ree ekflamegas. La flamo estas kaj restas. La vento povas ĝin malaltigi, ŝajne la ŝtormo ĝin forigas, ĝi ne lasas sin estingi, kaj ĉiam ree eklumas; ĝi estas eterna flamo....

Pluen glitas la pensoj returnen, al la tempo, kiam ni nur ĵus forlasis la lernejon, kaj — kiel oni nomas tion — eniris la vivon. En tiuj jaroj la amikoj kaj mi pli ol antaŭe ekatentis la aferojn ĉirkaŭ ni. Ni komencis informiĝi pri la kielo kaj kialo de multaj aferoj, kiujn ni antaŭe ne pensante akceptis. Ni konstatis multajn maljustaĵojn, kaj ni ofte estis plenaj de miro kaj indigno: Kiel la homoj povas ion tian toleri, tiuj maljunaj, saĝaj homoj, kiujn ni ĉiam alte devis estimi? La afero ja estis tiel klara: La tero povas produkti sufiĉe por doni al ĉiu, kion li bezonas, sed malgraŭ tio ni vidis, ke multaj malhavas eĉ la plej necesan. Ni ekprotestis. Jen oni faras maljustaĵojn! Nia sento por justeco ofendiĝis. Alten leviĝis en ni flamo: devus esti agrable ekuzi ĉiujn siajn fortojn — kaj ni opiniis tiujn sufiĉe grandaj — por kontraŭbatali tiujn maljustaĵojn. Ni tuj vidis ĉiajn vojojn, kaj eĉ tre radikalajn. La flamo en ni ekardis, kaj ni volis ribeli kontraŭ la maljustaĵoj; ĉio ja tiel simple povus esti bonigata?... Poste ni komprenehle lernis, ke tio ne iras tiel simple, kaj multajn aferojn ni devis provizore nur akcepti. Sed la lumo flamadis en ni. Certe, kelkfoje ŝajnis, kvazaŭ la flamo en ni estingiĝis, ĉar en la jaroj, kiuj kuŝas post ni, ofte subita ventego atakis ĝin. Tiam eble estis en ni momento da senkuraĝeco, precipe kiam ni en la postaj krizaj jaroj vidis, ke nia idealo pri justeco estas pli malproksima ol iam antaŭe. Tamen ni ĉiam rapide venkis tian malfortiĝon, kaj montriĝis, ke la flamo ankoraŭ flamadas. Ankaŭ en la lastaj monatoj, kiam multaj okazaĵoj kvazaŭ ventokirloj superverŝis nin, nia lumo kelkfoje malaltiĝis. Sed ĝi neniam estingiĝis. Kio ajn ŝanĝiĝis, en ni restis vivadi la sopiro al mondo, kiu ne plu estos plena de egoismo, kaj sekve de malamo; en ni restis profunda deziro al mondo, en kiu justo kaj justeco ne plu estos nur vortoj. Por

la starigo de tia mondo, kiu vere rajtus nomiĝi komunumo, ni volas labori per ĉiuj fortoj, kiuj estas en ni. Ni ĉe tio bone konscias, ke la fortoj pri kiuj ĉiu el ni disponas individue estas nur tre modestaj....

Mi sidas ekstere en la silento de la somervespero; interne mi sentas kiel ĝojigan certecon: la flamo, kiu brulis en ni hieraŭ, flamas ankaŭ hodiaŭ, klare kaj trankvile, kaj ĝi ankaŭ morgaŭ estos en ni, jes, certe, ankaŭ morgaŭ!

H. P.

Trad. el „La Juna Batalado".

## AL LA FRATOJ.

1. Forte ni staru, fratoj amataj,
Por nia sankta afero!
Ni bataladu, kune tenataj
Per unu bela espero!

2. Regas ankoraŭ nokto sen luno,
La mondo dormas obstine,
Sed jam leviĝos baldaŭ la suno,
Por lumi, brili senfine.

3. Veku, ho veku, veku konstante,
Ne timu ridon, insulton!
Voku, ho voku, ripetadante,
Ĝis vi atingos aŭskulton!

4. Dekon da fojoj vane perdiĝos
La voko via ridata, —
La dekunua alradikiĝos,
Kaj kreskos frukto benata.

5. Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unuj de la aliaj....
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho, karaj fratoj vi miaj?

6. Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,
Ĉu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo?

7. Ĉu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentas jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon?

8. Iras senhalte via laboro
Honeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
Neniam malfortiĝante?

9. Forte ni staru, brave laboru,
Kuraĝe, ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo!

10. Ni ĝin kondukos ne ripozante,
Kaj nin lacigos nenio;
Ni ĝin traportos, sankte ĵurante,
Tra l' tuta mondo de Dio!

11. Malfacileco, malrapideco
Al ni la vojon ne baros.
Sen malhonora malkuraĝeco
Ni kion povos, ni faros.

12. Staras ankoraŭ en la komenco
La celo en malproksimo, —
Ni ĝin atingos per la potenco
De nia forta animo!

13. Ni ĝin atingos per la potenco
De nia sankta fervoro,
Ni ĝin atingos per pacienco
Kaj per sentima laboro.

14. Glora la celo, sankta l' afero,
La venko — baldaŭ ĝi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ĝoje nin benos.

15. Tiam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa!

L. L. ZAMENHOF (1889).

**„Nenio krom la Vero povas teni la Veron".**

## EL „ORIGINALA VERKARO" (Traktaĵoj).

Kiam en mia urbo estos fondita templo homarana, mi devas kiel eble pli ofte viziti ĝin, por frate kunvenadi tie kun homaranoj de aliaj religioj, ellaboradi kune kun ili morojn kaj festojn neŭtralehomajn kaj tiamaniere kunhelpi al la iom-post-ioma ellaboriĝo de filozofie pura, sed samtempe bela, poezia kaj varma vivo-reguliga religio komune-homa, kiun ĝepatroj povos sen hipokriteco transdoni al siaj infanoj. En la templo homarana mi aŭskultados la verkojn de la grandaj instruintoj de la homaro pri la vivo kaj morto kaj pri la rilato de nia „mi" al la universo kaj al la eterneco, filozofie-etikajn interparolojn, altigajn kaj nobligajn himnojn ktp. Tiu ĉi templo devas edukadi la junulojn kiel batalantojn por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco, ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malnoblaj malvirtoj; tiu ĉi templo devas donadi spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al la suferantoj, doni la eblecon senŝarĝigi sian konsciencon al tiuj, ĉe kiuj ĝi estas ŝarĝita per io ktp. Tiel longe kiel en mia urbo ne ekzistas templo homarana, mi devos kiel eble plej ofte kunvenadi por komunaj interparoladoj kun aliaj homaranoj de mia urbo, kaj se tiaj ne ekzistas, mi devas komuniĝadi letere kun homaranoj de aliaj urboj.

---

## LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO".

La „Postskribo" el la taglibro de Roger Cosyns (Blankenberghe, Belgio), pri la dua Internacia Junularkunveno. (Tervuren, 7—14 Aŭg. '39).

„Spite niaj ĝojoj, niaj ridoj, niaj aventuroj, niaj deziroj kaj esperoj: Spite ĉio, la kongreso finiĝis.

Nun ni staras meze de la materiala vivo, meze de la ĥaosa mondo.

Tagoj jam forpasis, eĉ monatoj, sed des pli belega fariĝas al mi tiu restado en Tervuren.

Kiam mi cirkaŭrigardas kaj ekvidas la ĉagrenon, la minacon super ni, tiam mi revokas en mi Tervuren."

Ho Tervuren !

Tiam mi des pli bone komprenas, kia estis la kunveno.

Tervuren! Ne plu revenos tiaj belegaj tagoj. Neniam plu.

Pasintaj, sed ne forgesitaj!

Ĉiela tempo! Paradiza vivo!

En Tervuren kreskis nia amikeco; por ni ĝi estas nuntempe la plej bona apogilo! Ŝajne mi sola staras. Sed en malĝojaj tagoj mi sentas vin ĉiujn, karajn amikojn, ĉirkaŭ mi!

Vi vivadas en mia koro, vi ĝojigas min: vi estas la plej granda parto el mia vivo!

Dum la adiaŭo ni kriis unu al la alia: „Ĝis revido en Boulogne s/Mer!" Jam tiam ni faris belegajn planojn. Esperante ni rigardis en la estonto. Nekonata ĝi ĉiam ŝajnas bela.

Al la Estonto ni donacis niajn dezirojn, niajn esperojn, niajn ĝojojn! Sed, ĝi trompis nin! Nia deziro je renkonto ne realiĝos. La grava situacio internacia malpermesas. Nia bela perspektivo malaperas.

Mi malĝojas.... ĉar estas en tiaj malbonaj tempoj ke mi sopiras al renkonto. Ho, renkonto ĉiam sonas bele, amike.

Mi kelkfoje revoltas kontraŭ la sorto de l'homa vivo, sed vane, mi poste des pli forte devas kompreni kaj klini la kapon.

Malami la vivon mi ne povas, mi ne rajtas; ĉar tro bela, tro kara ĝi estas. Sed homoj ni estas, kaj ni ĉiam deziras!

Homaj deziroj: ni certe rajtas fari tion.

Sed, jes, super ni svebas io, kaj tio estas la plej granda demandsigno: la sorto. Vi certe jam rimarkis, miaj karaj, ke mi en ĉio ekvidas la sorton. Eble ne estas logike, eble jes.... sed devas esti io aŭ iu, kiu gvidas tielmaniere niajn vivovojojn.

Ĉu vi ankoraŭ ne demandis vin, kial okazas tio aŭ tio, kial vi ne povas fari ion, kial vi renkontas tiun personon!

Ĉiam kial! Ege strange! Nekompreneble!!

. . . . . . . . . . . . .

Monatoj jam pasis, mi diris. Kia longa tempo!

Ĉiutage mi rememoras, mi pripensas, kaj kiam mi rigardas la fotojn, mi ne scias, kia mi devas esti: Feliĉa aŭ malfeliĉa. Mi perdis ion kaj mi rajtas malĝoji, sed mi trovis bonegajn geamikojn, mi travivis neforgeseblajn tagojn, mi kunportis rememorojn kaj mi devas ĝoji.

Kiom kara estas la vivo, kiu donacis al mi tiajn rememorojn. Fakte mi ne rajtas malesperi.

Ho amikoj, kiom karaj vi estas al mi, ĉiutage vi vivadas en mi. Mi ne povas vivi sen Tini, Jekke, Denie, Job, Rein, Floor, Carlos, Jef. For estus la apogo en tiu ĉi vivo, kiun mi ne komprenas. Vi ĉiuj apartenas al mi. Kiom kara posedaĵo ! Mi ĝojas, mi feliĉas, ~~sed mi~~ ankaŭ timas!

Meze de ĝojo mi ĉiam timas: ĉar ĉu mi longtempe posedos ĝin, ĉu mi longtempe posedos vin, miajn karulojn.

Nun, kiam distancoj, limoj, ankoraŭ ne sufiĉas disigi nin, svebas gravaj minacoj super ni. Ili estas la plej gravaj: pripensu ke pro ili ĉiama disiĝo povas ekesti inter ni!

Sed ni esperu.

Esperi, ni ĉiam devas. La vivo nur estas espero!!

La vivo postulas nian laboron, niajn zorgojn, nian penadon, kaj iam ĝi rekompencos nin. Iam ni ĝuos la plej agrablajn horetojn: revido certe venos, miaj karaj geamikoj.

Revido, renkonto, kiel kara ĝi sonas al mi.

Mi ĉesas, karaj amikoj, mi adiaŭas, sed angle mi diras....

„Ĝis revido.... ĝis revido!"

**La** taglibro de Roger jam nombras pli ol 200 paĝojn, kaj estas unu el **la** plej belaj libroj, kiujn mi iam legis. Ni iom post iom sendos ĝin al ĉiuj T.J.O. grupoj por laŭtlegi el ĝi. Estas bonega propagandilo en la nuna tempo. La red.

.... Jes, kara amikino, ankaŭ mi kredas ke iun tagon ĉiuj homoj komprenos, ke ili estas inteligentaj, kaj ne sovaĝaj bestoj. Malfeliĉe ili ankoraŭ ne komprenis tion. .... Respondante al via demando mi informas vin, ke mia edzino ankaŭ estas esperantistino. Mi lernigis al ŝi iom de nia lingvo. Malgraŭ tio ke



**La geedziĝ-festo de niaj portugalaj geamikoj.**

ŝi ne multe parolas Esperanton ŝi estas enkore samideanino. Nuntempe ŝi faras grandan tapiŝon plena je verdsteloj, por ke, kiam ni havos infaneton, ni fotu ĝin sur la tapiŝo kaj sendu al vi foton. Eble venontan januaron aŭ februaron mi estos patro de malgranda samidean(in)o. ....

Rasquinho Junior. Aljustrel, Portugalio.

.... Dankegon pro via kuraĝiga karto, kiu montras ke la fidelaj amikoj ĉiam laboras por nia kara idealo. Mi ĝojos ree vidi nian gazeton „La Juna Vivo", kaj „La Peranto". En Svislando aperas la „Esperanto" de UEA kaj la „Svisa Espero". En Svislando estas ankoraŭ bonaj Esperantistoj. Mi esperas, ke baldaŭ ni svisoj ekkonos la devizon: Ju pli mizere estas, des pli energie kaj ame ni devas labori por nia kara lingvo kaj idealo.

Walter Kobelt. Rheineck (Svisio).

# La Marŝkanto de la Junularo

(originala teksto)

Juneco estas nia flag',
Espero nia fort',
Frateca estas nia ag',
Amika nia vort',
Pacama nia gvidmotiv'
Por tuta nia far'.
Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras al la viv'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'.

Ridantaj lipoj beltrezor'
De vivoĝoj' sen lim',
En sana korpo, gaja kor'
Kaj suno en l'anim',
En brustoj niaj la edif'
De firma solidar'.

Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras al la viv'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'.

La ĝojo de ĉi nova tag'
La belo de l'natur'
Direktas nin al la imag'
De l'granda aventur',
Al la brilega perspektiv'
Estonta de taskar'.
Ni man' en man' en kolektiv'
Kantante iras al la viv'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'
Ni junular',
Tra kampo kaj arbar'.

Muziko de Karel Kandael. F. V. Dorno.

Dediĉita al „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO" Aŭg. '39.

Forte ni staru, fratoj amatoj,
Por nia sankta afero!

La lastan numeron de „La Juna Vivo" ni denove sendis al fidelaj amikoj en jenaj landoj: Germanujo, Danujo, Finnlando, Hispanujo, Portugalio, Svedio, Italio, Svisio, Usono, Argentino kaj Brazilo. Ni tre ĝojas pri tiu internacia kontakto, ĉar pli ol iam antaŭe ni sentas nian devon subteni ĝin. Sed — pli ol iam antaŭe malhelpas nin la financa problemo!

Se ni ne ricevos fortan monan subtenon de nederlandaj amikoj kaj grupoj, ne plu eblos sendi la revuon eksterlanden.

Nederlandaj geamikoj, bone pripensu nian peton. Priparolu ĝin kun viaj geamikoj kaj en la kluboj. Multaj malgrandaj moneroj formos unu grandan sumon, kiu ŝirmos la tiel necesan internacian kontakton inter la tutmonda esperantistaro!

**Donacetoj: por „La Juna Vivo".**
S-ino P. v. B. en A.: f 1.50.

**Atentu!**

Se estas eksterlandaj geamikoj, kiuj ne ricevis ĉiujn ekzemplerojn de „La Juna Vivo", kaj kiuj ankoraŭ deziras ricevi la gazetojn, ili bonvolu sciigi tion al la red. de „La Juna Vivo", Limmen (N.H.), Nederlando. La red. tre petas tiujn personojn samtempe aldoni etan sciigon pri la Esperanto-movado en sia ĉirkaŭaĵo.

**KUNVENO EN LIMMEN (28-29-30 decembro).**

En ĉi tiu kunveno partoprenos la pli aĝa junularo kaj plenaĝuloj, kiuj sentas intereson por la idealo de d-ro Zamenhof. Estas la intenco, ke dum tiu kunveno kelkaj personoj donu enkondukon pri iu temo rilate al la „Homaranismo", kiun ili opinias grava. Poste ĉiu ĉeestanto povas diri sian opinion pri la temo. Por ke ne regu miskompreno, ni parolos holandlingve. La nura kondiĉo estas, ke ni ne ataku alies religion aŭ opinion, kaj nur donas konstruan kritikon. La kostoj por partopreno estos proksimume 1 guld. Pluajn detalojn ni sciigos per cirkulero al la diversaj grupoj. Sed ni jam nun petas tiujn, kiuj volas prizorgi iun temon, ke ili tion kiom eble plej baldaŭ sciigu al la red. de „La Juna Vivo", por ke ni en la cirkulero povu sciigi la plenan programon. Certe estos gravega kunveno, en kiu ni multe lernos pri la idealo de Dr. Zamenhof kiu nun komencas maturiĝi en la animo de multaj homoj.

(Limmen kuŝas 3 K.M. de Castricum kaj 8 K.M. de Alkmaar kaj estas atingebla ĉiuhore per vagonaro kaj aŭtobuso de Amsterdamo, Harlemo kaj Alkmaar.)

## Por komencantoj.

### Li havis buteron.

Sambo vidis fantomon. Tremante li rakontis, kio okazis al li: „Mi venis el la bovinejo, kun la lakto, kaj subite mi aŭdis bruon, kaj tiam mi vidis la fantomon!"

„Ĉu vi ne timis?" oni demandis al li. „Vi certe multe tremis!"
„Tremi?" diris Sambo. „Mi ne scias, sed kiam mi eniris la domon, ne plu estis lakto en la sitelo. Mi nur havis buteron!"

**Ankaŭ bone.**

Petro vizitis feston, kaj tiam li trinkis tro multe da alkoholaĵoj. Kiam li promenis hejmen, li renkontis sinjoron en bela uniformo. Petro opiniis, ke estas iu hotelpordisto. Li balbutis:
„Aŭskultu! Bonvolu mendi por mi aŭtomobilon!"
„Sed sinjoro!" ekkoleris la uniformulo. „Mi ne estas pordisto! Mi estas ŝipestro!"
„Ankaŭ bone!" respondis Petro. „Tiam bonvolu tuj mendi ŝipon por mi."

**La karuselo.**

Antaŭ la mondmilito germana fabriko ricevis la komision fari vapor-karuselon por iu germano en Orient-Afriko. La sinjoro esperis per tiu aparato gajni multan monon inter la negroj. Oni plenumis la mendon, kaj meĥanikisto de la fabriko vojaĝis kun la karuselo al Afriko. En la ĝusta loko li starigis ĝin, kaj li instruis al negro, kiel servi la maŝinon. Poste li foriris.

Kiam oni malfermis la karuselon, de ĉiuj flankoj venis la negroj, el ĉiuj regionoj. Mire ili rigardis tian mirindaĵon. La posedanto solene invitis la plej gravajn negro-estrojn eniri la karuselon, por ke ili faru la unuan rondiron sur la ĉevaletoj aŭ en la boatetoj. Ĝoje ili akceptis la inviton. La gurdo komencis ludi, kaj la karuselo ekmoviĝis. La rigardantoj kriis pro admiro. Post momento la nigra meĥanikisto volis haltigi la maŝinon, por ke ankaŭ aliaj povu eniri. Sed vane li klopodis. La karuselo turniĝis ĉiam pli rapide, kaj la gurdo sonis ĉiam pli laŭte. Time la negro-estroj tenis la nukojn de la ĉevaletoj, kaj dum ses horoj ili flugis ĉirkaŭe. Finfine la brulaĵoj de la maŝino elĉerpiĝis, kaj tiam ĝi haltis. De tiu tago neniu plu vizitis la karuselon!

**Respondu al jenaj demandoj:**

Kiu mendis la karuselon? Kial li mendis ĝin? Ĉu li mem iris al Germanio por alporti ĝin? Kiu vojaĝis kun la karuselo al Afriko? Ĉ li sufiĉe longe restis tie? Ĉu la meĥanikisto klarigis la maŝinon de la karuselo al la posedanto? Ĉu multaj negroj venis por vidi la novaĵon? Kiuj unue rajtis eniri la karuselon? Ĉu ili ĝuis la aparaton? Kio okazis? Ĉu la posedanto spertis plezuron per ĝi?

## Kontrabando-afero.

Germana farmisto, kiu loĝis apud la nederlanda landlimo, aĉetis en Nederlando bovidon. Tiu besto li volis sen imposto porti al Germanio. Lia ruza servisto Fritz promesis transporti la beston al la stalo de sia mastro.

Posttagmeze, je la 2a, Fritz foriras kun puŝĉaro. Sur tiu ĉaro kuŝas malplena sako. Kiam Fritz alvenas ĉe la holanda farmo, li kaptas la hundon, kiu tie estas, kaj metas ĝin en la sakon. Li ligas ĝin sur la ĉaron, kaj foriras.

„Mi revenos!" li krias al la farmisto, kiu mire rigardas: Ĉi tiu jam spertis multajn kontrabando-aferojn, sed ĉi tion li ne komprenas.

Fine Fritz estas en la germana doganejo.

„Haltu! Ĉu vi havas nenion por kontroli?"

„Ne, sinjoroj, nenion. En ĉi tiu sako estas granda hundo, sed kiam mi malfermas la sakon, ĝi forkuras."

„Jes, jes! Tion ni kredas. Nur malfermu la sakon!"

En la sama momento Belo elsaltas, trans la landlimon, kaj reiras al sia mastro.

„Jen," plendas Fritz. „Nun mi reen devas marŝi duonhoron por reporti la hundon!"

Post duona horo Fritz ree aperas ĉe la doganejo. „Ĝi denove estas en la sako!" li krias.

„Bone," ili diras, kaj per mansigno ili montras, ke li povas daŭrigi.

Post duona horo la bovido estas en la stalo, je granda kontenteco de la mastro.

**Respondu al jenaj demandoj:**

Kion oni volis transporti trans la landlimon? Kial la germana farmisto ne tuj kunportis la beston? Kiu transportis ĝin? Kiel Fritz iris al la holanda farmo? Kial li kunportis sakon? Ĉu la holanda farmisto komprenis la aferon? Kio okazis en la doganejo? Ĉu Fritz la duan fojon denove metis la hundon en la sakon? Ĉu la doganoj denove esploris la sakon? Ĉu la mastro kontentis pri Fritz?

**Tasko :**

1. Laŭtlegu ĉiujn rakontojn en la rubriko „Por Komencantoj".
2. Notu ĉiujn vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Li havis buteron".
4. Lernu parkere „Ankaŭ bone".

# TRE SIMPLAJ EKZERCOJ POR TIUJ, KIUJ NUR MALLONGE STUDIS ESPERANTON.

## Dombestoj.

Bestoj, kiuj loĝas kun homo aŭ ĉe homo kaj helpas lin en laboro, estas dombestoj. Al ili apartenas: ĉevalo, bovo, bovino, azeno, hundo, kato, kapro, ŝafo kaj porko. La dombestoj havas unu kapon, kvar piedojn kaj unu voston. La plej eleganta kaj forta besto estas la ĉevalo. Ĝi estas utila besto, ĉar ĝi laboras kun homo kaj oni rajdas sur ĝi. La ĉevalo havas voston kun tre longaj haroj. Mia hundo estas tre inteligenta besto. Ĝi komprenas, kion oni diras al ĝi. Per la vosto ĝi montras, ke ĝi estas feliĉa. La hundo estas ankaŭ fidela besto kaj nia bona amiko. Tial ni tre ŝatas hundon. Porko estas dika kaj malpura besto, ĉar la homoj donas al ĝi malpurajn manĝaĵojn, kaj ili faras ĝin dika. Mi ne ŝatas porkon, sed mi tre ŝatas bonan ŝinkon kaj kolbason.

Kiuj bestoj estas dombestoj? Kiun helpas dombestoj en la laboro? Kiuj bestoj apartenas al dombestoj? Kia besto estas ĉevalo? Kial ĝi estas utila besto? Ĉu oni rajdas sur porko? Sur kiuj bestoj oni rajdas? Kion havas dombestoj? Kian voston havas ĉevalo? Kaj porko? Kiu besto estas tre inteligenta? Ĉu hundoj komprenas, kion oni diras al ili? Per kio montras hundo, ke ĝi estas feliĉa? Kion montras hundo per la vosto? Kiu besto estas fidela kaj bona amiko de la homo? Kial ni ŝatas hundojn? Kia besto estas porko? Kial ĝi estas malpura? Ĉu homoj ŝatas porkojn? Kion ili ŝatas?

Kia estas la domo de via onklo? Ĉu la familio de via onklo estas granda? El kio konsistas la domo? Kie dormas viaj geonkloj? Ĉu en la tuta domo estas nur unu dormĉambro? Kiuj mebloj estas en la dormĉambro? Por kiuj estas la aliaj dormĉambroj? Kia meblo estas lito? Ĉu vi havas gekuzojn? Kie manĝas la familio? Kio estas ĉirkaŭ la domo? Kie estas la granda ĝardeno? Kio estas en ĝi? Kie ŝatas la geknaboj ludi?

Hodiaŭ ni havis interesan lecionon en la lernejo. La instruisto venis en la klason kaj parolis Esperanton kun ni. Ni bone komprenis lin, ĉar li parolis malrapide kaj elegante. Poste li skribis per kreto novajn vortojn sur la tabulo. Sed ili ne estis vortoj, nur ciferoj. Ni kalkulis de unu ĝis dek, poste de dek ĝis cent kaj mil. Ni respondis bone kaj la instruisto estis tre kontenta. Poste li prezentis al ni grandan kalendaron. Ĝi prezentis unu jaron aŭ dek du monatojn. Ni rigardis la kalendaron kaj vidis sur ĝi ruĝajn kaj nigrajn tagojn. Ni diris, ke ni tre ŝatas ruĝajn

tagojn. Mia amiko Edvardo sidas en la lasta benko, kaj mi en la unua. Lia patro havas hejme dek du krajonojn. Esperanto estas tre utila lingvo, ĉar unue — ĝi estas la plej facila lingvo, due — ĝi estas la monda lingvo.

Ĉu hodiaŭ estis interesa leciono? Kiu venis en la klason? Kian lingvon li parolis? Ĉu ni bone komprenis lin? Kial ni bone komprenis lin? Kiajn vortojn li skribis sur la tabulo? Kio estis la novaj vortoj? Kion ni faris? De kiom ĝis kiom ni kalkulis? Kiel ni respondis? Ĉu la instruisto estis kontenta? Kion li montris al ni? Kion prezentas la kalendaro? Ĉu vi ŝatas ruĝajn tagojn? Kial vi ŝatas la ruĝajn tagojn? En la kioma benko sidas vi? Kiu lingvo estas tre utila? Ĉu vi scias, kiom da lingvoj estas en la tuta mondo?

Kiom da tagoj havas unu jaro? Kiom da semajnoj? Kiom da monatoj? Kiom da tagoj havas ĉiu semajno? Ĉu ĉiu monato havas 30 tagojn? Diru al mi la nomojn de la monatoj! La kioma monato estas decembro? Ĉu novembro estas la lasta monato? Kiom da horoj havas unu plena tago? El kiom da minutoj konsistas unu horo? Kiom estas tridek kaj tridek? Ĉu tridek malpli dudek estas kvin? Kiom da jaroj havas via plej aĝa frato? Ĉu nun estas la dekdua horo? Kiu tago estis hieraŭ? Diru al mi la hodiaŭan tagon! Kioma estis hieraŭ? Kioma horo nun estas?

## La ĝusta respondo.

La serĝento demandis al la novaj soldatoj, kial oni faras la kapojn de la pafiloj el ligno de nuksarboj.

„Ĉar tio estas pli forta," diris unu.

„Ĉar ĝi estas pli elasta," diris alia.

„Eble ĉar ĝi estas pli bela," kuraĝis la tria.

„Ne respondu tiel stulte!" kriis la serĝento. „Ĉar tiel staras en la instrukcioj!"

## ENIGMOJ

1. x x x x x
2. x x x x
3. x x x
4. x x
5. x

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:
1. akvobeston; 2. ... nur geavoj povas posedi; 3. duhufan, kvarpiedan dombeston; 4. nomon de letero; 5. vokalon.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn; ni atendos solvojn ĝis 1 januaro.

**Solvo el No 2-3.**

Kimrio — Kimro —krio —kio —ok —k —ok — kor' — roko —krono — korneo.

# tjo komunikoj

**Tutmonda Junular-Organizo.**

Komunikojn por ĉi tiu rubriko oni sendu al la sekretario, Lingestraat 11, Leerdam.

**Kunvenoj.**

Heilo. La 6-an de oktobro oni montris la T. J. O.-filmojn en Heilo, Nh. La kunveno, en kiu ĉeestis + 90 personoj, bone sukcesis; rezulte de ĝi stariĝis infankursoj de 14 infanoj.

Westgraftdijk. La Tjo-grupo „La Kampfloroj” en Westgraftdijk aranĝis brilsukcesan semajnfinon en sia vilaĝo, je la 26a kaj 27a de oktobro. La nombro da partoprenantoj ankoraŭ superis tiun de la Tjo-kunvenoj dum la pasinta somero.

La sabatvespera programo estis libera; diversaj grupoj kaj personoj prezentis ion. Dimanĉmatene s.ro Schut montris la filmojn pri la junularkunvenoj en Groet kaj Tervueren. Dimanĉtagmeze estis la oficiala festkunveno; en ĝi ĉeestis krom la partoprenantoj al la semajnfino ankaŭ diversaj esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo kaj multaj vilaĝanoj neesperantistaj, entute 260 personoj. La programo estis tre varia kaj zorge aranĝita: komuna deklamado de „la Kampfloroj”, teatraĵoj, muzikado, popoldancoj, ktp., ktp.

Ni scias, ke ni parolas laŭ ĉiuj ĉeestintoj, se ni esprimas al la aranĝintoj nian varman dankon pro tiuj neforgeseblaj tagoj.

Post la semajnfino „la Kampfloroj” aranĝis ankoraŭ intiman kunvenon por la frisaj partoprenantoj, kiuj gastloĝis kelkajn tagojn en Westgraftdijk.

**Nia propra kanto.** En Tervueren s.ro Dorno donis al ni la provizoran tekston de la „Marŝkanto de la Junularo”. Poste li sendis al ni la originalan tekston. Pro eraro miaflanke tiu teksto ankoraŭ ne publikiĝis. Ni korektu tiun eraron kaj presigu la originalan tekston ĉi sube:

**„La Peranto”.** La 8a numero de „La Peranto” aperos en la komenco de la nova jaro. Ni petas alsendon de raportoj kaj aliaj enpresigindaĵoj.

**Kursoj.** En la jenaj lokoj niaj anoj starigis novajn infankursojn: Akersloot, Castricum, Heiloo, Koedijk kaj Westgraftdijk.

Niaj anoj gvidas daŭrigajn kursojn en Badhoevedorp, Castricum, Heiloo, Koedijk, Krommeniedijk, Leerdam, Leeuwarden, Limmen, Texel kaj Westgraftdijk.

**Atentu!** Se vi sendas monon al la propagandservo en Leerdam, tiam ne forgesu aldoni la nomon de la kontotenanto s.ro J. Kars, Meent 35, Leerdam.

**Donaco:** S.ro B. en A'dam. f 0.50.

**Grava sciigo.** En la komenco de Aprilo la grupo el Koedijk aranĝos semajfinon en Koedijk. Detalaj sciigoj en la venonta numero.

**Perantoj! Sendu regule novaĵojn pri viaj grupoj al la sekretario.**

# KORESPONDADRESOJ

**Argentino :** Pri natursciencoj dez. kor.: Hector Oesterheld, 3 de Febrero 1058, Buenos Aires.

**Argentino :** Omar Pedroni, str. Rivadavia 777, Esperanza F. C. S. F. (18-j. studento) dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Resp. certa.

**Argentino :** Jozefo Pitignani, Avellaneda 234. Bis-Rosario, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

**Argentino :** Julio Cordoba, S. de Pinedo 1626, Rosario, dez. kor. kun tramistoj kaj fakaj laboristoj en la tuta mondo.

**Belgio :** Volas korespondi kun nederlanda junul(in)o, pri nederlanda literaturo, nederl. aŭ esperante, C. Braet, Rijksnormaalschool, Blankenberge.

**Bulgarujo :** Ignat Nikolov Ivanov, ĉefa fervoj-tarifisto, dez. kor. kun fremdlandaj fervojistoj. Stoĉna gara, Sofia.

„ Dimitr Kostov, oficisto, dez. kor. kun eksterlandanoj pri ĉ. t., precipe pri muziko. turismo, ktp. 10, str. Regentska, Sofia.

„ Boris Mihajlov, fortisto, kor. per il. pk. kaj l. kun fortistoj pri arbaraj temoj. 73, str. Car Boris, Sofia.

„ Mihail Lazarov, oficisto, dez. kor. pri literaturo kaj publicismo. Bolnica za gârdobolni, Sofia.

„ Dimitr Dojĉef, tajloro, dez. kor. kun fremdlandaj samideanoj. 93, str. Car Boris, Sofia.

„ Ivan Dimitrov, juna esperanto-verkisto, dez. kor., 93, str. Car Boris, Sofia.

„ F-ino Tinka Zafirova, dez. kor., 57, str. Car Samuil, Sofia.

„ F-ino Penka Trifona, dez. kor. Esperanto-domo. 50 str. Alabin, Sofia.

„ F-ino Katja Nikolova, dez. kor., 37 str. Erma, Sofia IX.

„ Dimitr D. Stojkov, librovendisto, 26-j., kor. k. gesamideanoj en la tuta mondo. Librejo „Polet", 48, bul. Carica Ioanna, Sofia.

**Danujo :** S-ro Sögaard, instruisto, Skränten 12, Skive, dez. kor. La anonco ĉiam validas.

**Portugalio :** Antonio Pereira, Simĉes, Rua Dr. Oliveira Salazar, 24, San Tago de Cacéru, Portugal. deziras korespondi.

**Nederlando :** Elizabeth de Graaf (17-jara), Schoolstr. 10, Oosterend, Texel, dez. kor.

„ Geertje de Graaf (17-jara), Spang (de Waal), Texel, dez. kor.

„ Freek Barhorst (17-jara), „La Aŭroro", Kerkebuurt, Texel, dez. kor.

„ Jannie Daalder (17-jara), Peperstr. 28, Oosterend, Texel, dez. kor.

„ Rennie Timmer (17-jara), Weststr. 37, Oosterend, Texel, dez. kor.

„ Abraham J. de Smit (17-jara), Zevenhuizen, Texel.

**Islando :** Carl Herman Lundholm, Reykjahlid, Mosfellssveit, (22-jara ĝardenisto) dez. kor. kaj interŝ. poŝm. kaj il. poŝtkartojn.

**Islando :** Haukur Kristoffersson (ĝardenisto) Reykjahlid, Mosfellssveit, dez. kor. kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj.

**Latvujo :** Voldemaro Rozentals, 37-jara librotenisto, Andreju Osta —5, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Ne interŝanĝas poŝtmarkojn.

**Nederlando :** S-ro Nic. Broerse, arĥitekto, Hoornsekade 11, Delft, dez. kor. ankaŭ kun gejunuloj. Resp. certa. La anonco validas ĉiam.
„ F-ino Ied v. d. Hoogen, flegistino, 18-j., Provinciaal Ziekenhuis, Bakkum (N.H.), dez. kor. precipe kun skoltoj.
„ Thea Martens (13-jara lernantino), Siegfriedstr. 26, Bakkum (N.H.), dez. kor.
„ Marie Oudejans (12-jara lernantino), Steenewoningen 28, Bakkum (N.H.), dez. kor.
„ F-ino Elsa Kloevekorn, Noordweg B 53b, St. Laurens bij Middelburg, petas poŝtk., let,. kaj ĉiajn esp-aĵojn el tuta mondo. Anonco val. ĉiam.

**Momente vi povas esperante korespondi (per poŝtkartoj aŭ leteroj) kun ĉiuj landoj, escepte kun Germanio, Anglio, kaj Francio.**

**Por Ameriko aldonu „laŭ Portugalio".**
**Presaĵojn vi ankaŭ povas sendi al Germanio.**

---

## Anoncetoj (30 c. por ĉiu linio).

**SKRIBA ESPERANTO-KURSO por Komencantoj,** belaspekta, ilustrita lernolibreto kaj ciklostilitaj lecionoj. Korekto senpaga. Prezo gld. 0.95.

**SKRIBA ESPERANTO-KURSO, preparanta por diplomo A.** 25 lecionoj, legolernolibro, historilibreto, multaj buŝaj kaj skribaj ekzamen-ekzercoj. Senpaga korekto. Prezo nur gld. 1.95. Ambaŭ kursoj eld. „L.J.V."

**INTERNACIA LERNOLIBRETO** „L.J.V.", 2-a eldono. Belaspekta. il. libreto, enhavo 16 lecionoj. Prezo po 20c plus afranko. Rabato ĉe grandaj mendoj.

**INTERNACIA KANTARO „L.J.V.",** praktika formato, enhavo: 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo: 35 c. — 2 ekz. por 50 c. plus afranko.

**VIVO DE ZAMENHOF - Edm. Privat.** Ĉiu Esperantisto nepre legu ĉi verkon pri la vivo de nia majstro. Prezo (bind.) guld. 1.75. Oni instigu la ne-Esperantistojn legi la nederlandan eldonon. Prezo (broŝ.) guld. 1.25. Mendeblaj la „La Juna Vivo", Limmen (N.H.), Nederlando.

**TUTMONDA MOVADO** eldonis la unuan cirkuleron holandlingve kaj la duan cirkuleron Esperante.
Ambaŭ cirkuleroj estas senpage akireblaj. Petu informojn al s-ino v. Veenendaal, Limmen (N.H.).